

EKO 2025

Bleko kun eĥo

EKO 2025-12. Marto 18. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: Sume 300 KB

Ronda tablo pri *Lingvo kaj artefarita intelekto*

Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino estis organizanto de dutaga popularscienca Ronda Tablo pri *Lingvo kaj artefarita intelekto* en Sarajevo ekde la 21-a de februaro. La Federacia Ministerio pri Edukado kaj Scienco estis la aŭspicianto kaj ĉefa financanto de la renkontiĝo. En la ronda tablo partoprenis trideko da sciencistoj esploristoj el Sarajevo, Zenica, Bihać, Tuzla, plus tiuj el Kroatio, Serbio, Nederlando kaj Danlando.

ELBH speciale dankas al **s-ro Jovan Zarković** de Serbia Esperanto-Ligo kaj **s-ino Ankica Jagnjić** de Kroata Esperanto-Ligo pro helpo pri samtempa tradukado.

Britio en Litovio

Konatiĝu kun **Tim Owen**, direktoro de Esperanto-Asocio de Britio, kiu kadre de BET-59 en Kaŭno (julio 2025) prezentos la originon de nia simbolaro, kaj prilumos tion, kion hodiaŭulo priatentu kreante simbolon uzotan plurmaniere por sia organizaĵo; legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/02/bet-176/>.

Funebra dokumento

Jen la cifereca versio de la libreto, kies papera versio disdoniĝis dum la funebra ceremonio de karmemora prof. Renato Corsetti en la 3-a de marto.

La registraĵo de la ceremonio estas spektebla per tiu ĉi ligilo:

<https://watch2.obitus.com>; Uzanto-nomo: vero3909; Pasvorto: 014355

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

Universitata agado en Litovio

Litova Esperanto-Asocio subskribis kontrakton kun la Universitato Vytautas Magnus. La universitato ĉiun duan jaron okazigas konferencon pri multlingveco. Maje tio okazos.

Oni ŝatus havi sektion pri interlingvistiko aŭ esperantologio. Eblas partopreno kaj ĉeeste, kaj malĉeeste. Registrado de partoprenantoj okazos ĝis la 17-a de marto.

<https://uki.vdu.lt/call-for-participation-in-the-international-conference-sustainable-multilingualism-2025/>

Aida Čizikaitė

Cifereca edukado

Mi resendas mesaĝon de Unesko kun alvokoj (en la angla kaj franca) pri

1. Tago de cifereca lernado en merkredo 19 marto 2025
2. Semajno de cifereca lernado 2-5 septembro 2025
3. Alvoko al kontribuoj pri Artefarita Intelektio kaj lernado, ĝis 30 aprilo 2025
4. Alvoko al kandidateco por kvar premioj pri uzo de Informadikaj kaj Komunikaj Tehnologioj por Edukado, ĝis 28 marto 2025

Didier Janot



Junuloj kaj Lingvoj

Tio estas nova reta evento, kiu okazas ekde 2023. Dum tio la partoprenantoj prelegas, diskutas aŭ prezentas ion interesan pri sia gepatra lingvo per Esperanto. Do ĝi estas per Esperanto kaj ne pri Esperanto. Ĝi kunigas esperantistojn el la tuta mondo, kiuj en afabla etoso emas lerni pri lingvoj kaj kulturoj per amikema interagado kun aliaj samideanoj. La evento estas malferma al la partopreno de esperantistoj sendepende de aĝo kaj membreco en organizoj.

Fonto: Gazetara komuniko de UEA/TEJO

Kostarika kunfestado

Ĉi-jare estas la centjara datreveno de la forpaso de Carlos Gagini, grava kostarika svisdevena lingvisto kaj verkisto. Li estis pioniro de la lingva esplorado pri indiĝenaj lingvoj kaj pri la nacia literaturo. Li estas speciale konata pro siaj esploroj pri la hispanlingva leksikografio. Li lernis Esperanton kaj donis rolon al la Internacia Lingvo en sia sciencfikcia romano *La falo de l'aglo*, krome li verkis alfabetumon de Esperanto, kiu estis publikigita nur faksimile en 1993. Dum 2025 pluraj organizoj, inter kiuj la Ministerio pri Kulturo kaj Junularo, la Nacia Biblioteko kaj la Instituto pri Lingvistikaj Esploroj de la Universitato de Kostariko okazigos plurajn eventojn pri la vivo kaj la verkaro de Carlos Gagini. Mi estis invitita al la unua de tiuj eventoj, kiu estas rondtablo, en la Nacia Biblioteko, la 18-an de marto. Tiam mi parolos pri Carlos Gagini kaj Esperanto; por tiu okazo, estos inaŭgurita ekspozicio al kiu mi kontribuis per teksto, kaj en la hispana kaj en esperanto, pri la grava rolo de esperanto en lia vizio pri la mondo; ĝi estas 'vojaĝanta' ekspozicio montrata en pluraj regionoj de la lando.

Jen kelkaj interesaj ligoj pri la temo:

1. Artikolo pri Carlos Gagini en la Panteono ĉe Edukado.net:

<https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=188>

2. PDF de la romano *La falo de l'Aglo*

3. Ĉe la Kostarika Parlamento:

https://www.asamblea.go.cr/sd/Otras_publicaciones/La%20caída%20del%20águila%20-%20novela.pdf

Antonio Leoni

Liaoning aktivas en Ĉinio

La 16-an de marto okazos la laborkunveno de Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo (LEKK), Ĉinio. Ĝi ĉefe inkluzivas elekton de novaj estraranoj, diskuton kaj decidon pri la laborplano por 2025 kaj la malferman ceremonion de la printempa reta Eo-kurso por la Ĉina Asocio de Volontuloj kaj kunsidon memore al nia estimata klubano Renato Corsetti

Wu Guojiang, Prezidanto de Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo (LEKK), Ĉinio

Onda demonstro

Aperis la demonstra versio de la decembra (vintra, laŭ la nordhemisfera vidpunkto) eldono de *La Ondo de Esperanto*. La 49-paĝa demoversio (pdf) enhavas plurajn tekstojn kaj tekstokomencojn el la riĉenhava 140-paĝa numero de *La Ondo*. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2025/03/ondo-138/> elŝutu senpage la demoversion kaj pripensu vian (re)abonon.

Brazila balono

Jen porinfana priesperanta kanto, nome [La verda balono](#), traduko farita de **Vitor Mendes** el la portugallingva *Superfantástico*. Tiu ĉi kanto furoris antaŭ kelkaj jaroj per la voĉoj de la bando **A Turma do Balão Mágico**: *./bildo estas BR*

Ondo per PayPal

Ekde nun la sendependa internacia gazeto *La Ondo de Esperanto* denove estas abonebla per la internacia pagosistemo *PayPal*. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2025/03/ondo-139/> kaj (re)abonu la *Ondon* por 2025.

Utilaj ligoj pri la verkoj de Ilona Koutny

<https://esfconnected.org/2025/02/20/ilona-koutny-gvidlumo-en-esperanto-studoj/>

Intervjuo en ESKU <https://www.youtube.com/watch?v=5TRy0YyQZmw>

Interlingvistika sekcio kadre de la **Internacia Lingvista kongreso** en 2024, raporto: <https://ciplnet.com/interlinguistics-workshop-during-icl21/>; https://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/raporto_sep24_ICL.html

https://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/magistraj_raporto_jun24.html

raporto pri la lasta interlingvistika sesio:

<https://edukado.net/novajhoj?id=910> <https://www.youtube.com/watch?v=9WJHb8nuR5o>
resumo de la studoj

<https://www.liberafolio.org/2024/10/08/esperantistoj-preferas-konvinkadi-aliajn/>

Prelego pri **Szerdahelyi**: <https://www.youtube.com/watch?v=vuqwtu8Nss0>

<https://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/Szerdahelyi-100.html>

Libroj: <https://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/> k <https://wydawnictworys.com/>

recenzo pri E-kulturo: <https://sezonoj.ru/2023/05/recenzo-138/>

Prezento de IK en IpI 123: https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2023/07/IpI_123.pdf

Fondaĵo Canuto invitas novajn kandidatojn

Tiu fondaĵo de UEA bonvenigas proponojn por membrigo en la nuna jaro. En 2024 la subteno helpis 768 personojn, jam ĉi-jare la sumo atingis 201 kaj tiu sumo kreskos plie.

Se vi konas meritan movadanon kiu ne estas jam membrigita, sendu al mi detalojn.

Instruistino Susia en Ĉinio

Pro la Internacia Virina Tago, la 204-a forumo de IKEF invitis la esperantistino Susia, sekciestrino de la ĉina bazlernejo BJSJ fari prelegon pri sia lernejo kun sep profesiaj Esperanto-instruistinoj por instrui al 400 gelernantoj Esperanton kiel devigan lecionon kaj al 50 gelernantoj kiel nedevigan lecionon. Ĉeestantoj dialogis kun Susia.

Pakistana progreso

La 26-an de februaro, PakEsA sukcese okazigis la Unuan Estraran Kunsidon de la jaro 2025 en Lahore. Oni ankaŭ okazigis seminarion en la memoro de forpasintoj:

- La 21-jara Allama Muzter Abbasi
- D-ro. Renato Corsetti eks-Prezidanto de UEA kaj Honora Prezidanto de UEA.
- Javid Ehsan, eks-Ĝen. Sek. de PakEsA kaj Eks-Komitatano de UEA kaj Honora Prezidanto de PakEsA.

Shabbir Ahmad Sial, Prezidanto de PakEsA.

Renato rememore

La funebra ceremonio de Renato okazis la 3-an de marto. Por homoj, kiuj ne povos ĉeesti surloke, eblos spekti ĝin uzante la jenan ligilon:

<https://watch2.obitus.com>; Uzantnomo: vero3909; Pasvorto: 014355

Anna L.

Mondaj, ondaj jubileoj

En marto ni festos la jubileojn de **Povilas Jegorovas** (70 jaroj) kaj **Carlo Minnaja** (85 jaroj) kaj rememoros la forpasintajn prezidintojn de UEA **Hector Hodler** kaj **Ernfrid Carl Malmgren**, kaj la prezidinton de la Akademio de Esperanto **Théophile Cart** kaj aliajn meritplenajn esperantistojn. Legu la liston de Esperantaj memordatoj por marto 2025, kiun kompilis Aleksander Korĵenkov, en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/03/marto-12/>.

===== vortoj: 985 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikaĵoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikaĵo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikaĵoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikaĵojn pere de retlisto.